



Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél 1 - (Francujo)

JARABONO :

Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajeroj
Simpla : 5 fkoj }
Bonfara : 10 fkoj } Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62
(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO
1963

6

KULTURAJ KAJEROJ

1963

Novembro - Decembro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

EN H A V O

Venontan jaron (P. Babin).

Esperanto tra la mondo.

El Finnlando (H. Koivu).

Karakterizaj Kontraŭecoj (E. Lapenna).

Albert Camus (Levy - Juchault).

Pri la filo de Dumas (P. Balkanyi).

Gravaj datrevenoj.

De infanoj... por infanoj :

La fontaneto kiu volis ne plu flui.

Por via distro :

Nia konkurso.

Gramatiko per Bonhumoro.

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

Venontan Jaron

Laŭkute multaj homoj en la mondo baldaŭ deziros unu al la alia ĉion bonan kaj feliĉon okaze de la komenciĝo de la nova jaro. Ĉu okazaj, surfacaj aŭ profunde elkoraj sentoj? Ne gravas. Ĉar ne sufiĉas la deziroj. Nur helpo al la plenumado de tiuj deziroj valoras. Kompreneble ne en la solvo de ĉies problemoj oni povas partopreni. Vi, unuopa persono, ne povas malhelpi, ke en tiu aŭ tiu-ĉi parto de la mondo homoj mortmalsatu aŭ mortigu unu la alian. Vi mem ne povas influi kontraŭ la devastiĝon de tiu aŭ tiu-ĉi malsano eĉ kiam ĝi koncernas al vi tre karaj personoj. Sed ĉiu povas helpi per simpatio, ke la malfeliĉuloj ne sentu sin izolaj.

Koncerne pli ĝeneralajn problemojn, la esperantistoj, ĉar ili estas esperantistoj, — eĉ se ili estas ankoraŭ nur esperanto-balbutantaj — ne povas resti indiferentaj. Ekzistas grupoj tre diversaj, kiuj okupiĝas pri iu problemoj nuntempe, kiuj helpas per mono, per agado, per defendo de simplaj ideoj favoraj al la homa feliĉo, aŭ almenaŭ al la akcelo de la movado celanta al tiu feliĉo. Pri kio spiras la homo?

Pri la respekto, fare de ĉiuj, de la homrajtoj. Respekto de la unua artikolo de la Universala Deklaro, kiu diras: « Ĉiuj homoj naskiĝas libe-

raj kaj egalaj pri digno kaj rajtoj ». Respekto de la dua artikolo, kiu diras: « Ĉiu rajtas pretendi pro ĉiuj rajtoj kaj liberoj proklamitaj en tiu Deklaro, sen diferencigo pro raso, koloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ ia ajn opinio, nacia aŭ socia deveno... ». Respekto de la artikolo 26-2, kiu diras: « Edukado akcelu la interkomprenon, la toleremon kaj amikecon inter ĉiuj nacioj, kaj rasaj aŭ religiaj grupoj. »

Kaj ni, esperantistoj, povas, kaj devas, helpi pri tiu respekto de la Universala Deklaro de la Homrajtoj per partopreno en iu el la multaj, diversaj grupoj aŭ asocioj, kiuj laboras favore al tiu celo. Tiamaniere ni montros, ke Esperanto alportis al ni ne nur lingvan scipovon, ne nur ion, kio utilas al la esperantistoj mem, sed malavaremon al ĉiuj homoj. La esperantistoj ne agadu nur en esperantistaj medioj sed ekster ili, en grupoj ne-esperantistaj, kiuj laboras pri la ideoj al ni karaj.

Fakte, komence de la nova jaro, mi deziras, ke ĉiuj bone pripensu la frazon legeblan sur la kovrilo de nia revuo: « Homoj ni estas kaj nenio homa estas al ni fremda. »

P. BABIN.



KULTURAJ KAJEROJ deziras al ĉiuj siaj legantoj feliĉon kaj agrablan legadon dum la tuta venonta jaro.

Esperanto tra la Mondo



Internaciaj renkontoj sur la neĝo

— Por la jarfino, vintra feriosemajno okazos en Aŭstrujo, en Edlach (26-12 - 1-1) kun posta kvartaga restado en Vieno.

— El Svisujo, oni anoncas skiferion en Adelboden (26-12 - 4-1), kun skiado, ekskursoj, prelegoj.

— La esperantistaj Naturamikoj de Aŭstrujo organizas skirestadon apud Salzburg, je 1950 m. (22-12 - 1-1).

La franca kongreso en Parizo, dum Pentekosto 64

La 56a nacia kongreso de Esperanto, organizata de U.F.E., okazos en Parizo (16-18 de majo, dum Pentekosto). De nun oni anoncas konkurson de junaj oratoroj kaj, la 17^a de majo, noktan promenadon per ŝipeto. Adreso de U.F.E. : 34, rue de Chabrol, Paris (10^e). Redukta kosto ĝis la 31-1-64 (7 F.).

Renkonto por studentoj okazis en Primošten

Kun sukceso okazis (14-21-8), en la Esperanto-tendumejo de Primošten (Jugoslavio), la unua semajno de Studenta Tutmonda Esperantista Ligo. Pli ol 50 gestudentoj el 3 kontinentoj ĉeestis.

La franca respondeculo de STELO estas nun : F. Simonnet, 16, rue Dohis, Vincennes (Seine).

La Universala Kongreso de 1964

Ĝi okazos en Hago (Nederlando) de la 1^a ĝis la 8^a de aŭgusto. Adreso : U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2 (Parto de la kongreso okazos en Scheveningen).

Antaŭkongreso en Bruselo ; postkongreso en Leeuwarden (Frislando).

La Junulara Kongreso okazos en Amsterdam (8-15 de aŭgusto) : aparta adreso : 20a I.J.K., Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z (Nederlando).

Aliaj esperantaj manifestacioj

— S.A.T. - kongreso en Narbonne (Francujo).

— Kongreso de la katolikaj esperantistoj, en Valencio (Hispanujo), samtempe kun la hispana nacia esperanto-kongreso).

— Kongreso de la fervojistoj, en Bruselo (Belgujo), 9-15 - 5).

Opinio de lingvisto

En la novembra numero de « Kuriero de UNESCO », aperis tripaĝa artikolo de S-ro Mario Pei, profesoro de romana filologio ĉe la Columbia-Universitato en New-York, pri la problemoj de internacia lingvo. Prof. Pei ne pledis rekte por esperanto sed li plurfoje simpatie menciis ĝin kaj precipe, donis tre trafajn argumentojn favore al internacia lingvo.

Fakaj asocioj por filologoj

Fondiĝis filologia sekcio. Provizora sekretario : S-ro L. Marikin, ul. Dimo H. Dimov 53, Sofio-6, Bulgario.

... kaj por farmaciistoj

La Asocio de Farmaciistoj (nova adreso : Via Lucullo, N. 6, Roma, Italujo), fariĝis « internacia centro » sub protekto de la itala « Sendependa Kultur-Movado ».

Geonkloj esperantistaj

Se vi havas eblecon korespondi kun infano, nova esperantisto, gvidi lin lingve kaj kuraĝigi lin, iĝu « onklo esperantista ».

Turnu vin al S-ro Sullivan, 3, Berwick Av., Urmston, Manchester, Britujo.

Novaj stratoj « Zamenhof »

— La 6a de oktobro, en Montelimar (Francujo), la deputito-urbestro oficiale inaŭguris la Zamenhof-straton.

— Oni anoncas ankaŭ « straton Zamenhof » en Olomouc, Ĉeĥoslovakio.

Universitata disertacio pri la Esperanto-gazetoj

— Mag. Roman Dobrzynski, finante siajn studojn en la ĵurnalisma fakoj de la Varsovia Universitato, ĵus sukcese defendis diplom-disertacion sub titolo : « La esperanta gazetaro ».

En Britujo : intensaj kursoj por geinstruistoj

— Fine de aŭgusto, 44 personoj el kiuj la plimulto estis geinstruistoj partoprenis intensajn kursojn, en Barlaston, Anglujo.

La kursojn interalie gvidis Marjorie Boulton kaj Juan Regulo Perez, la direktoro de la esperanto-eldonejo « La Stafeto » (en Kanariaj Insuloj).

Brazila « birdsimfonio »

En San Paulo, aperis disko kun kantoj de birdoj de Brazilo, kun akompano de klarigoj en esperanto.

El Finnlando

ALANDO

(svede *Aland*, finne *Ahvenanmaa*)

Alando estas insularo inter Baltika Maro kaj Botnia Golfo en Sudokcidenta Finnlando. Ĝi konsistas el 6.500 insuloj, kies loĝantaro (25.000) estas svedlingva.

Alando ekaperis en la lumstrion de la mondo pro tio, ke Aŭstrio postulas por la Suda Tirolo apartenanta al Italio similan aŭtonomion, kian Alando havas en Finnlando. Tiu provinco havas propran 15 membran « provincan konsilantaron » (parlamenton), kiu rajtas fari leĝojn validajn en la provinco, pri la aferoj, kiuj ne laŭ la konstitucio apartenas al la decidrajto de Finnlanda parlamento. La 5-membra « provinca komitato » estas la vera registaro de la provinco.

En Alando ne ekzistas partioj, la loĝantoj ne havas devon militservi, eksteruloj ne rajtas tie posedi teron kaj oni ne rajtas tie fondi finnlingvaj lernejojn. Iu loĝanto tamen havas finnlingvan nomon kaj brandovendejo havas ankaŭ finnlingvan ŝildon. La ĉefaj metioj en Alando estas fiŝkaptado, navigado kaj vivado per turistoj.

En Finnlando ekzistas ankaŭ aliaj svedlingvaj regionoj, unu sur la bordo de Botnia Golfo kaj alia sur la bordo de Finna Golfo. Nuntempe la svedlingva loĝantaro kun la alandanoj estas 8 % el la tuta loĝantaro. Pri la konservo de sveda lingvo kaj svedlingva kulturo estas bone zorgita per leĝoj. Ekzistas unu svedlingva kaj unu dulingva universitatoj, pluraj svedlingvaj altlernejoj, kaj en ĉiaspacaj lernejoj la instruistaro estas proporcie pli granda ol en la finnlingvaj lernejoj. Antaŭ 100 jaroj sveda lingvo estis la sola oficiala lingvo en la lando, sed

iom post iom oni havigis per insista batalo egalrajton por finna lingvo (ĉefe per la leĝo de 1922). Sed laŭ la natura evoluo la proporcia nombro de svedlingvanoj malpliigis kaj senĉese malpliigas.


KIRUNA KAJ ĜIA ĈIRKAŬAĴO.

La vorto « kiiruna » estas finnlingva nomo de arbara kokbirdo « *lagopus mutus* », sed en la formo *kiruna* ĝis estas la nomo de urbeto en Norda Svedlando. La nombro de ĝiaj loĝantoj estas malpli ol dudekmil. Sed Kiruna estas ankaŭ urbego, verŝajne la plej granda en la mondo, ĉar ĝia aero estas 13.181 kvadratkilometroj. La loĝantaro estas grandparte finna, same kiel en ĝia ĉirkaŭaĵo.

La urbo estas mirinda tiurilate, ke ĝi estas « duetaĝa ». Sub la urbo en la profundo de ĉ. 400 metroj troviĝas subtera urbo kun stratoj, trafiklumoj, aŭtoj, aŭtobusoj, vendejoj, restoracioj kaj aliaj rekoniloj de urbo. Tiu subtera urbo estas grandega minejo.

En Kiruna troviĝas du montoj, en kiuj troviĝas 2,5 miliardoj da tunoj da ferminaĵo magnetito. La surtera parto de unu el la montoj estas jam forfosita, sed la subtera parto, el kiu oni eksportas ĉiujare 16 milionoj da tunoj, sufiĉas ankoraŭ por 150 jaroj. La fosado kaj transporto okazas per elektraj maŝinoj, sed por la uzo kaj riparo de ili oni bezonas 200 laboristojn.

Dum la lastaj jaroj ankaŭ la ĉirkaŭaĵo de Kiruna fariĝis grava, ĉar tiun 120 km longan kaj 75 km larĝan regionon dekunu ŝtatoj (Svedio, Norvegio, Danlando, Belgio, Francio, Italio, Svislando, Hispanio, Germanio, Aŭstrio kaj Britio) faros komuna bazo por sciencaj esploroj de spaco per raketoj kaj



satelitoj. Oni esploras ĉefe la radiadon, kiu venas el spaco. — Por la sekureco de la loĝantaro (parte finna, parte lapona) oni faros diversajn multekostajn aranĝojn.

PUIJO

Kio estas Puijo? — Ĝi estas monto, aŭ eble monteto, apud urbo Kuopio en Finnlando. Ĝia supro estas 233 m super la marnivelo kaj 152 m. super la apuda lago Kallavesi.

Jam en la jaro 1856 oni konstruis sur la monto 16 m. altan lignan vidaĵturon, kiun anstataŭis, en 1906, 24 m. alta turo el ŝtonoj, kaj de tiam Puijo estas rimarkinda turista loko.

En Aŭgusto 1963 tiu turo ricevis apud si novan turon, kies alteco estas 75 m., kaj ĝia formo estas tre speciala kaj kuraĝa. Ĝi estas relative maldika sed alta cilindro, en kies supro estas vasta ronda parto enhavanta restoracion, kiu povas turniĝi ĉirkaŭ sia akso. La vidaĵo de tie etendiĝas al ĉiu direkto pli ol 100 km.; kaj la videbla regiono havas ampleksojn de 45 mil kvadratkilometroj aŭ 13 % el la tuta lando. Du liftoj servas por trafiko supren kaj malsupren. De nun Puijo altiros la atenton de turistoj pli ol antaŭe.

Dum la unua monato post la malfermo de la turo ĝin vizitis 70.000 homoj.

Vidaĵturo sur Puijo

EMILIJA LAPENNA SKRIBIS POR VI :

KONTRAUECOJ KARAKTERIZAJ

Ekzistas certe multaj problemoj en la movado, kiuj ofte aspektas nevenkeblaj. Problemojn sendube konis ankaŭ la unua periodo de la movado, la tempo de Zamenhof, tamen la hodiaŭaj estas tre diferencaj de la tiamaj. Krome, hodiaŭ ni ne plu povas konsoli nin, ke Esperanto estas io nova kaj ke estus tro pretende postuli, ke ĉiuj sciuj, kio ĝi estas. Vere tiu « ĉiuj » rilatas nur relative civilizitajn milojn de Eŭropanoj, Nord-amerikanoj kaj loĝantoj de la urboj en la tuta mondo. Aliaj milojn kaj milojn de « ĉiuj » el vastegaj dezertaj, montaraj kaj praarbaraj regionoj de Azio, Afriko kaj Sud-ameriko, al kiuj la nuntempa civilizeco ne sukcesis ĝis nun ebligi eĉ lego - kaj skribo - kapablojn, tiuj milojn certe nenion scias pri Esperanto. Sed tutsame certe, tiuj nenion scias pri Molière, Tolstoj, Shakespeare, pri ekzisto de Francio kaj de iu Eŭropo. Tiuj do pri multaj, multaj aferoj devos ekscii antaŭ ol ili povos eksenti la bezonon por la internacia lingvo kaj komenci pensi pri ĝia solvo.

La aliaj relative civilizitaj, kiuj havis la feliĉon ellerni legi kaj skribi, viziti pli altajn lernejojn kaj ekscii pri elementoj de la scienco, literaturo kaj arto, tiuj milojn, kiuj opinias sin « evoluintaj » nacioj — por kio ili uzas sian akiritan scion? Verŝajne okdek procentoj de tiuj legas nur iun tag-jurnalon, 5-cendan kriminal-romanon en daŭrigoj kaj tradukaj surskriboj sub iu nesinkronigita filmo. Ili sentus ne tro grandan mankon, se iu katastrofo neniigus ĉiujn bibliotekojn, sciencajn librojn, pentraĵojn, skulptaĵojn kaj la tutan not-akivon de la klasika muziko.

« Ĉiuj », kiuj devus ion scii pri Esperanto

estas nur eble dudek procentoj de la homoj, kiuj havis feliĉon frandi ĉiujn fruktojn de la nuntempa civilizo : lernadon, fakan kaj superan specialistigon, kapablon orienti sin en ĉiuj artobranĉoj. Kvankam tiuj prezentas tre maldikan popoltavolon komparataj kun la nombro de la tuta homaro, tamen ili plej gravas. Ili ĉie decidas, ordonas, akceptas aŭ malakceptas. De parlamentoj ĝis elementaj lernejoj, de fabrikestraro ĝis turistaj oficejoj. Tiuj ne estas indiferentaj rilate ĉion, pri kio ilia televida ekrano ne informis ilin. Tiuj kutime volas scii pri ĉio kaj interesiĝas pri ĉio, aŭ mem, aŭ pere de siaj sekretarioj aŭ pere de la tutaj informdonaj servoj. Sed antaŭ ĉio ili interesiĝas pri sia fako en kiu ili deĵoras. Fakeco fariĝis la moderna kulto kaj multaj pritaksas ĉion en la mondo nur tra prismo de la fakeca grado. Jen, en tio kuŝas unu el la gravaj problemoj de nia movado. Ĝi estas amatora ĉar libervola, kaj pro tio kontraŭeca al la reganta etoso. Pedagogoj priridas la plimulton de niaj lernolibroj, ĉar ili estas laŭ la principoj de la moderna pedagogio « avecaj ». Fak-propagandistoj havas nur kompateman rideton pro niaj metodoj aplikitaj en vardo de novaj kursanoj. Ekonomistoj — nu, tiuj eĉ rideton ne povas dediĉi al financa-ekonomia agado en niaj societoj kaj asocioj, tio ja estas sub ĉiuj eblaj niveloj.

Kion do fari en tia situacio? La movado ne havas monon por pagi fakulojn kaj realigon de iliaj fak-ideoj. Aliflanke la movado en la hodiaŭa tempo ne povas permesi al si labori fuŝe, diletantisme kaj malfake ĉar tio ĉiam povas provoki atakojn kaj priridojn, kion la publiko rimarkos pli ol dek sukcesajn agojn de la movado.

Tamen io estas farebla kaj farenda. Ion la movado posedas ankoraŭ. Sufiĉan prudenton kapablan prijuĝi kio bonas kaj kio ne, kaj sufiĉe da bona volo kaj koro plenumi la laborojn, ne por akiro de monprofito, sed pro la ideo.

La prudento devas en ĉiu unuopa okazo prijuĝi kio estas plibonigebla, en kiuj agadkampoj diletantismo kaj fuŝ-laboroj estas absolute ne plu toreblaj kaj kie ili estas ankoraŭ permeseblaj pro la imperativo de la cirkonstancoj.

Verklaboro kaj publicismo estas du agadkampoj en kiuj kaj pro la 76-a jara historio de la movado kaj pro la ekzistanta reala stato, diletantismo estas ekstermenda. En ĉiuj niaj eldonejoj kuŝas dekoj da manuskriptoj atendantaj eldonvicon. Preskaŭ ĉiuj perloj de la monda literaturo estas esperantigitaj. Originala esperanta literaturo atingis la nivelon de naciaj literaturoj, eble ne la supron de tiu nivelo, sed la mezon nepre. Multegaj esperantaj libroj polvas en libroponejoj, nevenditaj. En tiu situacio eldoni verkojn sen sufiĉa literatura kvalito estas peko kontraŭ la vivantaj interesoj de la movado. Tiajn eldonaĵojn ni devas akre kritiki, sensentimentale priridi, kondamni, eĉ energie malebligi vendadon de tiaj libroj. Nur tielmaniere ili malaperos el nia eldona aktiveco.

Pri la publicismo validas la samo. En la movado aperas nun proksimume cent gazetojn, el kiuj preskaŭ ĉiuj vekrias pro manko da abonantoj. Kelkaj el tiuj estas kaj laŭ la aspekto kaj laŭ la enhavo veraj neallogaj bultenaĵoj, mallerte hektografitaj kaj fuŝe redaktitaj. Ĉu la movado bezonas tion? certe ne. Restu nur gazetoj havantaj sian publikon, sian publicisman fizionomion kaj sian « *raison d'être* » por ekzistado. Ĉiuj aliaj estas nur balasto.


Sed, bedaŭrinde, ne venis la tempo por esti tiel severa rilate ĉiujn agadkampojn.

Unu, en kiu ankoraŭ longe ni devos toleri duonbonan aŭ rekte malbonan kvaliton estas « Esperanto en lernejoj ». Iom strange, ke ĝuste tiu kampo, plej intime ligita al instruado, permesas malpedantecon, ne postulas altan kvaliton de fakeco. Jes, ĉar ege gravas ke en kiom eble plej multajn lernejojn pene-tru Esperanto. Rapide ni devos duobligi, eĉ triobligi la nombron de lernejoj, kie Esperanto estas instruata, se ni volas havi efikon de tiu agado. Kvalifikitaj instruistoj, bone konantaj kaj regantaj Esperanton, mankas, pro tio ĉiu eĉ bonvolema balbutanto estas konvena por komenci esperantan kurson en sia lernejo. Prefere ke tia kurso ekzistus en iu lernejo, eĉ gvidata de nesperta persono, ol ke ĝi ne ekzistu. La nombro en tiu agadkampoj ege gravas, pli ol la kvalito de instruado. Esperanto pro sia mirinda logikeco povas krei post unujara instruado lingve pli kapablan lernanton ol estas instruisto. Neniam ni scias kia granda ŝanco por la movado povas eliri el unu lerneja kurso. Precipe tio rilatas aliajn lernejojn, universitatojn, el kiuj diplomitoj povas tuj okupi ian gravan pozicion kaj veni en eblecon favore decidi ion pri la Internacia Lingvo.

Per ĉio tio ne estas malgravigitaj la klopodoj kapabligi kaj perfektigi instruistojn por esperantaj kursoj. Kontraŭe, per ĉiuj eblaj rimedoj kaj metodoj larĝigi kaj fortigi tiujn klopodojn, organizante seminariojn, ekzamenojn kaj specialajn kursojn kie ili ankoraŭ ne ekzistas. Rilate tiajn klopodojn ĝuste la franca movado kaj ĝia Grésillon estas modelaj.

Sed, ĝis la momento kiam la movado disponos per sufiĉe da kapablaj kaj kvalifikitaj pedagogoj, ni devos toleri ankaŭ ambiciajn duonbalbutantojn kiel gvidantojn de niaj lernejoj. La imperativo de la cirkonstancoj tion postulas kaj ĝi estas unu el la plej durkapaj fenomenoj en la mondo!

Emilija LAPENNA (Jugoslavio).



Antaŭ 50 jaroj naskiĝis

Albert Camus



Li ĝuis prestiĝan gloron, senĉese ĝenatan de demandantoj ; li estis famiĝinta kiam amaso da gejunuloj, eligante el halucina sonĝo, kvazaŭ blindopalpe serĉadis imitindulojn. Tamen, li ĉiam rifuzis tiun titolon : « porpensa majstro ». « *Por instrui, scio necesas ; por regi, necesas sinregi.* » Kio do li estis ? Albert Camus filo de la suno, de mizero kaj de morto. Ĉu intelektulo ? Jes, se intelektulo estas tiu, kiu vivas kaj rigardas sin vivanta. Ĉu artisto ? Jes, sed antaŭ ĉio plenvivemulo, fidelulo, kiu, kvankam konscia pri la absurdeco de la mondo, tamen decidis al ĝi korigiĝi. La hazardon de sia vivo li igis alvokigon. El lia fideleco al la homa grado, tiom da homoj tiras sian ĉefan moralajon.

La absurdo. — Jen vojo : de Sens al Parizo ; jen platano ; jen dato : la 4-an de Januaro 1960 ; jen horo : la 13-an kaj 55 minutoj ; okazas la nupto de Albert Camus kun morto. Ĝi estas neeviteble komparenda kun la sablero, kiu eniĝas en la universan harmonion, kaj grincigante la meĥanikon, fariĝas ĝia ĉefa motoro. Tiu sablero nomigas la absurdon, kiun Camus senmaskigas kaj konfesigas al la homoj mistifitaj de la ĥimero pri neŝancebla kosmo, spite kelkfoje konsternigajn ŝajnojn. Nu, kun tiuj ŝajnoj oni devas kalkuli. Tragedia simileco inter la absurdo kaj la morto de Camus...

Camus konsciis, ke sensenca estas tiu sencela kaj senespera agitiĝado, senutilaj la

suferoj, tio estas : de kiu, kial ni estas kondamnitaj ? « *La absurdo naskiĝas el la konfrontitaj homa alvoko kaj monda senbaza silento* ». Kiel de nun vivi plu, kiam oni malkovris la senzorgemon de ĉio ? Sed per sinmortigo, la homo povas nur sin kaj ĉion pereigi. Nur vivante per soleca klopodo li atestos, tagon post tago, sian nuran veraĵon, tiun defion : « *Vivi estas viviĝi la absurdon. Ĝin viviĝi estas unue ĝin rigardi* ».

La enradikiteco. — La « Mito pri Sizifo » ne estas la « Maksimoj » de La Rochefoucault. Kvankam konsciante pri la maljusteco de la mondo, Camus ĝin ne malpli amas pro tio. Li ĝuas la nunan momenton, la senton, la riĉecon de la mondo. En Tipasa, la unuan fojon, li komprenas, ke lia « *tuta reĝolando situas en tiu-ĉi mondo* » ;

« *Sub la suno de l'mateno, granda feliĉo balanciĝadas en la spacego...* Mi tie-ĉi komprenas, kion oni nomas radiceco : la rajton ami sen mezuro. Estas unika amo en la mondo. Ĉirkaŭpremi virinan korpon, tio estas ankaŭ teni ĉe si tiun strangan ĝojon, kiu fluas de la ĉielo malsupren al la maro... Malvarmetas la venteto kaj bluas la ĉielo. Tiun vivon mi amas senzorge kaj pri ĝi volas paroli libere. Ĝi igas min fieri je mia homa rango. Tamen, tion oni ofte diris al mi, nenio indas fieracon. Io indas ja : tiu suno, tiu maro, mia

koro pro juneco bateganta, mia korpo sal-
gusta, kaj la vastega panoramo sur kiu ka-
resemo kaj radieco kuniĝas en flavo kaj
bluo. » (el « Nupto en Tipasa »)

La verko de Camus esprimas la ekfra-
pon, la blindigon ricevitaĵn de ĉiu ajn homo
en Algerio. Ĉu tero benita de la dioj ? Ne,
ĉar en Algerio, ne ekzistas la dioj. La deziro
mem je dio forestas. Nur la tujan ĝojon, mal-
plenan je metafizika enteno, la nunan mo-
menton, la dumon, « kiam tagmezo ŝvebas
en la ĉielo. »

La historio. — La juneco, la maro, la su-
no ne forigas el lia verko mizeron kaj histo-
rion ; ne pro tio, ke mizero lin multĉe ĝenis :
« *Mi ne scipovas posedi... mi estas avara pri
tiu libereco, kiu svenas ekde kiam komenci-
ĝas la troeco de bienoj.* » Sed eĉ se li ne uzis
pri si la vorton « mizero », tiu-ĉi restas la
signo de la homa rango, kiu postulas batalon
kontraŭ tiuj blindaj fortoj : maljusteco kaj
premeco. Camus ne ignoris historion, tiun
« *ekstreman klopodon de la estuloj por rea-
ligi la plej akraŭdajn el siaj revoj.* » Camus
inter mizero kaj suno, ekkomprenis ja sian
nuran postulon, ke ĉiuj al la lumo altiĝu, sed
ankaŭ, ke kontraŭ historio estu gardata par-
to de la homo : « *ĉar estas historio, kaj estas
io alia, la simpla feliĉo, la pasioj de la estu-
loj, la beleco de la naturo* », enradikiteco,
kiun historio ignoras, sed por ankaŭ kiu ne-
cesas batali. Fidela al duobla alligiteco : al
beleco kaj al la humiligatoj, Camus estis
konvinkita, ke « *nei parton de tio, kio estas,
ne diferencas de la neado je sia propra este-
co, de la akcepto de prokura vivo.* »

La verko kaj la arto. — Tiu mizera kaj
luma mondo elfontigis lian genion ; estante
dudekjara li verkis « La posta kaj la antaŭa
flanko », pri tiu duobla aspekto de la mon-
do. Lia tuta verko elvoviĝas inter la absurdo
kaj la ribelado. Unuflanke, en « La Mito pri
Sizifo », « La Fremdulo » aŭ « Caligula », la
homo ekkonscias, ke li estas fremda en mon-

do ne por li farita ; « *La homoj mortas, kaj
ne estas feliĉaj.* » Aliflanke, en « La homo ri-
belanta », « La Pesto », aŭ « La Justuloj »,
ĉiuj homoj spertas la absurdon, ĉar ili kune
suferas pro la distanco inter ili kaj la mon-
do. Sed Camus, kvankam ne malestimante
la ribeladon, nek malagnoskante la agadon,
laŭdas kaj postulas mezuremon : « *necesas
agi sur la homa plano, kaj « ĉion dediĉi al
la nuna tempo estas pli malavare ol sin turni
al la venonto.* » Ĉi-tie la artisto devas agadi
rifuzante esti dio. Nur li « *ne rifuzante tiun
batalon, rifuzas kuniĝi kun la regula ar-
meo* ». Li estas la « liberpafisto ». Laŭ Ca-
mus, la moderna artisto estas ribelanto, kiu
pentras la realaĵon travivitan kaj suferitan.
Sed, se lia ribelado estas nur detruado, li
riskas trafi alispecan sterilecon. Li sin stre-
ĉas por sin altigi, sed ne atingas la homojn.
Paroli al la homoj estas al ili diri : plezuro,
suno, lukto kontraŭ morto, kaj tion diri ve-
rece. Ribelante kontraŭ la mondo, Camus
intencas ŝanĝi la formon de ĝi, sed el la mon-
do tia, kia ĝi estas. Nek tuta rifuzo, nek tuta
konsento, tia estas lia sinteno ankaŭ dum la
Algeria milito. Li aliĝis al neniu partio. Kiu
verkisto kuraĝus prediki pri virto ? La celo
de arto ne estas leĝado kaj juĝado, sed kom-
prenado : « *Vereco estas mistera, glitema,
ĉiam konkerota. Libereco estas danĝera, mal-
facile travivebla tiom, kiom ekzalta.* »

Eĉ se Camus senkompatate evidentigis la
absurdecon de la mondo, li tion faris kun ne
elrevigita rigardo. Tiu evidentigo ne estas
neado. Plie, li estis fidelulo al tiu tero de la
nuntempo, tero de vivantoj, sed silenta —
por ĉiam — pri la bagatelaj postmortaj oka-
zontaĵoj kaj iu ajn klarigo pri vivo kaj mor-
to ; por la homa agado li elektis justecon,
ne tiun teruran, abstraktan pasion, kiu mor-
tigante liberon tiom da homoj kripligis, sed
senprokraste porhoman justecon, ĉar kio es-
tus justeco sen la alproksimiĝo al la feliĉo ?

D. LEVY kaj M.T. JUHAULT.

Ĉu vivis filo de patro Dumas en Hungarujo ?


Laŭ preskaŭ legendaj rakontoj en la unua parto de la pasinta jarcento vivis sekrete en hungara vilaĝo Abony, la patro Dumas, la franca verkisto. Laŭ onidire la vizito de la interesa kaj flamema gastulo ne restis sen postsekvo kaj en la barona kastelo aristokratinino naskis en sekretaj cirkonstancoj knabeton. Laŭ rakonto de akuŝistino Jardek, je aŭtuna nokto oni vokis ŝin kaj Dron Jozsef Nagy en la kastelon, sed oni bendis iliajn okulojn kaj ili devis juri, ke ili tenos la aferon en sekreto. Kiam la kuracistino mortis en 1850, la akuŝistino tamen rakontis la historion. Dumas havis intimajn amikojn en Hungarujo. Inter ili estis grafo Ferenc Szapary, kiu faris rondvojaĝon en Okcidenta Eŭropo kaj ankaŭ la pli aĝa Dumas estis lia bona amiko. Li vizitis en decembro 1865 la tiaman urbon Pest, parto de la nuna Budapeŝto, eĉ farigis por si hungaran veston kaj tiun li portis, kiam en la Redutpalaco — en la sama, kie en 1929 estis la Universala Kongreso de Esperanto — li havis preleg-vesperon. Laŭdire li eĉ vizitis la regionon de ebenaja urbo Kecskemét kaj tie ekŝatis la hungaran manĝon « Gulyas » (gulas), kunportante eĉ ties recepton. Do estas strange, ke tiuokaze li ne vizitis sian amikon grafon Szapary, kiu depost 1855 vivis en sia bieno en Abony kaj tie mortis en 1875. Sed ĉu li aŭ alia estis la edzo de la edzino, iu baronino, ne estas pruvo. Oni rakontas pri aristokrataj geedzoj, kies unua filo naskiĝis post seĝara geedziĝo en la unua duono de la deknaua jarcento kaj laŭ kelkaj suspektoj ties natura patro estis la pli aĝa Dumas — kiu cetere laŭ deklaro de Lecomte multloke lasis multajn infanojn. Kelkaj eĉ opiniis, ke la knabo estis la juna Dumas, sed tio ne estas ĝusta, ja tiu naskiĝis en 1824 en Parizo.

Nu, por ni estas iom trafa kaj certe interesa la

romano de la pli juna Dumas : « La perla sinjorino ». Tiu havas parton, laŭ kiu Elizabeto skribis leteron el Abony, apud kiu la romanheroo Jakobo (Jacques) preterveturis, eĉ ne konjektante, ke la franca princino, kiun li serĉas, estas nun tie. Kaj tie okazis la naskiĝo de knabeto, la unua de la princino. Ŝia edzo ne havante heredanton akceptis la knabeton, kiel sian. Oni devas konjekti, ke la patro rakontis ion al sia filo pri la okazintaĵoj en Abony kaj la filo lerte uzis tion en sia romano. Tamen la afero ne estas tiel simpla. Oni ne povas certigi la opinion, ke temas pri patro Dumas kaj hungara baronino, ĉar la filo Dumas en tiu-ĉi romano — kiu aperis en 1853 — rakontas sian aventuron kun rusa grafino Lidia Zakrefsky, juna edzino de grafo Dimitrij Nesselrode ; do la princino estas la rusa grafino kaj la heroo Jacques de Feuil mem la juna Dumas.

La aferon uzis en novelo ankaŭ hungara verkisto Lajos Abony, al kiu la bofilo de la menciita kuracisto rakontis pri la sekreta okazintaĵo — do la kuracisto ankaŭ ne retenis la sekretojn ! Li verkis ĝin en 1857 post apero de la romano de juna Dumas. En la novelo la hungara verkisto ne skribas, kiu estas la patro de la fileto, sed deklaras en ĝi, ke la koncerna parto en la romano pri la perla sinjorino havas kontakton kun la kaŝita okazintaĵo, en kiu partoprenis « nia eminenta kaj neforgesebla kuracisto ». Kiel imaga epilogo aperis nuntempe rakonto, laŭ kiu junan hungaran aristokraton, kiu kiel diplomatfilo volis edziniĝi en Ameriko belan filinon de grava persono, la patro forpelas lin, ĉar li aspektas negro ! En la rakonto tiu juna viro estus pranepo de la negrodevena Dumas el ties hungara vizitado.

Pál Balkányi.




La tuta familio legas nian revuon

KULTURAJ KAJEROJ

(listo de la perantoj sur la lasta kovril-paĝo)


GRAVAJ



DATREVENOJ

Antaŭ 175 jaroj mortis en Hamburgo

Philip Emanuel BACH naskiĝinta en Weimar en 1714. Li estis la dua filo de J.S. Bach. Unue li estis juristo, sed fariĝis, en 1740, la cimbalista en la kapelo de Frederiko la Granda en Berlino, kaj orkestrestro de religia muziko en Hamburgo en 1767. Kiel komponisto li estis antaŭ-klasikulo. La sentimentaleco de lia pianoludo estis fame konata. Li estis alte taksita de siaj samtempuloj, ĉefe de Haydn. Li komponis sonatojn, multe da solo-pecoj, piano-koncertojn, simfoniojn kaj ĉambro-muzikon.



Antaŭ 100 jaroj naskiĝis en Loeiten

Edvard MUNCH. Tiu norvega pentristo multajn jarojn loĝis en Parizo, kie lia arto definitive formiĝis. Li poste revenis Germanion. Liaj komponaĵoj ne renkontis favoran akcepton de la publiko ĉe la komenco, kvankam oni povas konsideri lin unu el la kreintoj de la moderna pentrarto. En siaj hom-portretoj, ĝenerale mallumaj, li esprimis la valoron de la esencaj spertoj de la homo kiel la morto kaj la monda malsereneco. Liaj pejzaĝoj anoncas esprimismon.



Antaŭ 100 jaroj naskiĝis en Livorno

Pietro MASCAGNI. Tiu komponisto studis kun Puccini en Milano, kaj poste fariĝis direktoro de la Nacia Muzik-Lernejo en Romo kaj membro de la Itala Akademio en 1929. La tutmonda sukceso renkontita de lia opero « Cavalleria Rusticana » akcelis la disvastiĝon de « verismo ». Tiu arto-tendenco deziris ĉiাপреze prezenti la realon.

De Infanoj... por infanoj

La fontano, kiu volis ne plu flui

Iam estis knabo, kiu soifis. Li tiel multe soifis, ke li preskaŭ ne plu povis paroli. Lia lango estis tute seka, ankaŭ lia gorĝo kaj eĉ liaj lipoj. Li alproksimiĝis al la fontano kaj diris : « Donu al mi iom da akvo, al mi, kiu tiel multe soifas ! — Jes, respondis la fontano, mi estas tiu, kiu donas akvon al ĉiuj. »

Kaj la knabeto sin klinis por trinki en la kavo de siaj manoj ; Sed li estis malpura infano kaj kiam la fontano vidis liajn nigrajn manojn ĝi kraĉis kun kolera voĉo : « Ne ! Ne ! mi ne verŝas mian klaran akvon en malpurajn manojn. » La knabeto rigardis siajn nigrajn manojn kaj ilin kaŝis malantaŭ sian dorson. Sed ĉar li ankoraŭ multe soifis li intencis trinki per sia buŝo. Li ne sciis, ke lia vizaĝo ankaŭ estis tute makulita. Tuj la fontano ekhaltis kaj la knabeto ne povis trinki, eĉ ne unu guton. Li foriris malkontenta klinante sian kapon. Kaj li ĉiam pli soifis kaj lia buŝo estis ankoraŭ pli seka.

Ĉevalo venis por trinki el la baseno sed la knabeto ne volis same fari : estis tro malpure ! Virino venis kun sia sitelo. Ŝi volis akvon por fari sian supon kaj vidante, ke la fontano ne plu fluis ŝi ekkoleris : « Kiu elsekigis la fontanon ? » ŝi diris. Aliaj virinoj venis por preni akvon kaj malkontentiĝis : « Kaj miaj bovinoj, kiuj ne trinkis ? — Kiel mi faros mian supon ? — Kia maniere mi purigos mian kuirejon ? — Kaj mi, kiu intencis bani mian infanon ! — Kaj mi, kiu ne lavis mian vazaron ! » Ĉiuj volis akvon. eĉ la bovinoj, la azenoj, kaj ankaŭ la hundoj, kiuj trinkas el la rivereto ; kaj la ranoj !

Maljunulino tute kurbiginta alparolis la fontanon : « Nu, fontano, ĉu vi volas, ke mi mortu pro soifo ? Ĉu vi estas laca, ke vi volas ne plu flui ? » — « Mi denove fluos, respondis la fontano, kiam la malpura infano estos puriginta siajn manojn kaj vizaĝon. » Tute hontema, la knabeto ege deziris sin lavi, sed kie trovi akvon ? La

fontano estis tute seka, la rivero ne plu fluis, nek la torrento, nek la rivereto. Li foriris sur la monton, li grimpis laŭ la vojeto ĝis la bela fontaneto, kiun li ofte vizitis, tute supre, en la grandaj herbejoj. Sed ankaŭ la fontaneto estis tute seka, eĉ ne unu guton...

La knabeto ekploris. Li frotis sian vizaĝon per siaj malpuraj manoj kaj lia vizaĝo fariĝis ĉiam pli nigra same kiel tiu de la skrapisto. La infano daŭrigis sian iradon. Li atingis la lastajn ĉaledojn : ĉiuj fontoj estis sekaj. Kiel fari ? Nur sitelo da akvo estus sufiĉa, sed kie ĝin trovi ? La knabeto estis nun tre alte sur la monto kaj subite li ekvidis inter la rokoj amason da neĝo, kiu dormis tie same, kiel bebo en sia lulilo. « Fine, li ekkriis, mi povos tuj min lavi ! » Do li prenis dikan manplendon da neĝo kaj zorge, zorgege li frotis siajn manojn, supre, malsupre, ankaŭ la manartikojn kaj ĉiujn fingrojn ; kaj kiam liaj manoj estis tute blankaj, li tre zorge purigis sian vizaĝon, sian kolon, siajn orelojn. Kaj ĉar li ankoraŭ multe soifis, li elektis tre puran glaciecon kaj ĝin suĉis por freŝigi sian buŝon. Poste li pensis reveni en la vilaĝon ; li rapidis ĉar ĉiuj atendis lian revenon por ricevi akvon. Malsuprenirante li vekis ĉiujn dormantajn fontojn « Fontaneto, ĉu vi volas flui ? » — « Jes, vi estas tute beleta. » Li baldaŭ atingis la vilaĝon ; ĉiuj personoj atendis ĉirkaŭ la fontano. La knabeto diris : « Fontano, donu al mi akvon ! » Jen klara akvo por ĉiuj ! Kaj ĝi abunde ekfluis. La patrinoj rapidis por fari supon, kafon kaj ĉion. La bestoj trinkis laŭvole.

De tiu tago oni neniam plu vidis malpuran infanon en tiu vilaĝo.

Verkita de infanoj en la lernejo de St-Martin de Queyrières (Hautes-Alpes).

Tradukita de infanoj en la porknaba lernejo en Annemasse (Haute-Savoie).

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

1-a problemo :

Bonvolu anstataŭigi la punktojn per la taŭgaj vortoj en la 5 ĉi-subaj frazoj :

1. Same kiel fajro provas oron, ... malfeliĉo
provas kuragulon.
2. Neniam elparolu ... parolojn!
3. Li vidas sian lernantan difektantan .. libron.
4. Lia patrino tremas vidante ... marŝantan.
5. Malseka malvarmo defaladis ... la ĉielo
griza.

Estas kalkulotaj po 2 poentoj por ĉiu vorto
ĝuste eltrovita estas forprenota po 1 poento por
ĉiu netaŭga vorto.

Bonvolu en viaj respondoj reskribi la tutajn frazojn : ili ne estas tiel longaj !

2-a problemo :

LA SKATOLO DA BOMBONOJ

La naskiĝtagfesto de Erikio okazas komence de Decembro, kaj unu el la donacoj, kiujn li ricevis estas skatolo da bombonoj. Erikio decidis mangi nur unu la unuan tagon, kaj disdoni dekonon de la restaĵo: la morgaŭon li mangas du kaj disdonas la dekonon de la restaĵo; la sekvantan tagon li mangas tri kaj disdonas la dekonon de la restaĵo, ktp... ĝis kiam restas nenio en la skatolo, kio okazas multlonge antaŭ Kristnasko. Kiom da bombonoj entenis la skatolo?

Estos kalkulotaj 20 poentoj : 10 por la ĝusta respondo, kaj 10 por la klarigoj.

Bonvolu sendi viajn respondojn antaŭ la fino de Januaro 1964 al : S-ro P. Chevallier, 19, boul. G.-Lauriol, Nantes (L.-A.), Francujo, kiu deziras al vi bonan kuraĝon kaj feliĉan novjaron.

Tiuj, kiuj ne sendis lastan fojon la banderolon de la gazeto bonvolu sendi ĝin tiun monatoj, kiel atestilon de abono.

AMUZAJ PROBLEMOJ

Solvo de la lasta problemo : Kiom aĝai ni estas ?

Mia aĝo estu « **x** » kaj la aĝo de mia edzino « **y** »; estu « **a** » mia aĝo kaj « **b** » mia aĝo kaj tiu de mia edzino kiam ni geedziĝis :

$$ax - by + ay - bx = 553$$

$$(a - b)(x + y) = 553$$


Nur 1×553 kaj 7×79 faras 553. La unua solvo estas preteratentinda ĉar la sumo de niaj aĝoj ne povas esti 553. Do, la sumo de niaj aĝoj estas 79 kaj la diferenco 7.

36. Mia aĝo estas 43 kaj la aĝo de mia edzino estas

NOVA PROBLEMO (Sro Jarlier)

MAGIA KVADRATO

Loku en ciun fakon de la ĉi suba kvadrato nombron de 1 ĝis 9 tiamaniere, ke ĵa sumo da ciferoj de ĉiu horizontala, vertikala kaj diagonala kolumno estu 15



LUDO DE ERAROJ

Ciuj estas ĝojaj en tiuj bildoj. Ciuj sakoj kaj korboj estas plenaj je fruktoj. Sed antaŭ ol manĝi ilin estas necese trovi la ok erarojn.

GRAMATIKO PER... BONHUMORO


« Se antaŭ vorto, kiu havas verban sencon, ni deziras uzi prepozicion, ni devas doni al tiu verbosenca vorto la formon de substantivo ; ekzemple : anstataŭ « kun saluti » ni devas diri « kun saluto » ; anstataŭ « senrespondi » ni devas diri « sen saluto ». Se la vortoj « por » kaj « anstataŭ » estas uzataj kun la infinitivo ili tute

ne prezentas ian escepton, sed la kaŭzo de tia uzado estas alia, nome : la vortoj « por » kaj « anstataŭ » uzataj antaŭ infinitivo havas la sencon ne de pura prepozicio sed preskaŭ de konjunkcio. »


(L. L. ZAMENHOF - Lingvaj Respondoj).



Por bani bebon en akvo, varmigu ĝin en ujo...



Kial vi plonĝas **sen ia diro**



Anstataŭ heziti, rapidu. Via fratino atendas sian vicon.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (28 aŭst. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (50 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (7 ŝil.).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Valentin Kibalčí, TICHY POTOK, p. Brezonica n/T.

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (3,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (4 mark).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (55 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (600 liroj).

Italia Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO.

Jugoslavio : Slovenija Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBLJANA, Poŝtfako 239 (900 d.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rødes veg 56, LAMBERTSEDER (7 kr.).

Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (7 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (36 zlotoj).

Svedujo : S-ro R. Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö, Poŝtgiro : 157007 (6 kr.).

Svilando : Provizore vakas (Sendu viajn abonojn al la franca adreso).

Usono : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).

Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (14 st.), aŭ respondkuponoj (10 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandaĵn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo